


SVISA ESPERANTO - SOCIETO INFORMAS

N-ro 6a/1994 Speciala eldono

NOVENBRO



**BONVENON AL
LA MERKATIKA
SEMINARIO
DE SES!**

KIEL “VENDI” ESPERANTON AL LA SVISA PUBLIKO?

merkataka seminario sub la gvido de Marco Picasso

En **Lucerno**, hotelo Steghof (Voltastrasse 2), por la unua fojo en Svislando okazos seminario (nome intensa labor-semajnfino sub gvidado de profesiulo) pri la surmerkatego de nia lingvo.

Sabaton kaj dimanĉon, **7an kaj 8an de januaro**, matene kaj posttagmeze D-ro Marco Picasso, fakulo pri merkatego kaj docento pri esperanto-informado kaj publikaj rilatoj en *La Kvinpetalo*, gvidos seminarion pri la temo: **Kiel “vendi” esperanton al la svisa publiko?**

La partoprenontoj en la seminario devas anonci sin kiel eble plej frue, ĉar ili anticipe ricevos materialojn studendajn antaŭ la seminario mem. Unu el tiuj estos eseo de D-ro Giorgio Silfer pri la lingvopolitiko en Svislando; la eseo baziĝas sur la plej freŝaj informoj, ricevitaĵoj en lastatempa kolokvo pri lingva juro en la universitato de Friburgo.

Al po unu SES-ano, membro de unu el la agnoskitaj lokaj societoj (Ĝenevo, Laŭzano, Neŭŝatelo, Bazelo, Berno, Zuriko, Wil-Sangalo, Lucerno, Belinzono, Lokarno) SES pagos la tranoktadon, kondiĉe ke li/ŝi havu oficialan leteron de la propra klubo.

SES instigas lokajn kaj fakajn societojn same subvencii al pliaj aktivuloj, por ke la seminarion povu profiti kiel eble plej multaj personoj.

La seminario startos precize je 10h00 de sabato kaj ĉesos inter 16h00 kaj 17h00 de dimanĉo.



BONVENON!

AGADO 2003

Karaj SES-anoj, samideanoj kaj simpatiantoj,

Pasis apenaŭ unu jaro kaj duono ekde la aperigo en SI (n-ro 3/1993) de plurpaĝa informo pri la detala plano de “*Agado 2003*”. Vi certe ne forgesis tiun siglon, kaj mi ĝojas konfirmi ke ĝi ne restis nur projekto.

Mi mem, prezidanto de nur kelkaj monatoj, vigle interesiĝis, ankaŭ pere de (ek)vizitoj al lokaj grupoj, pri la efektivaj eblecoj de SES kaj pri la eventuale novaj deziroj de svisaj esperantistoj.

Agado 2003, kiel konate, celas provizi SES-on per la monrimedoj necesaj por produkti diversajn eldonaĵojn, ankaŭ perspektive al la centjara jubileo de la societo.

La kontaktoj kun la lokaj grupoj konvinkis min ke urĝe bezonata estas trilingva varbilo. Kia estu la enhavo de tiu varbilo? La respondo venos el la Seminario pri Surmerkatingo de Esperanto okazonta en Lucerno la sepan/okan de januaro 1995. Dum SES organizas kaj eĉ finance subtenas ĉi tiun gravan labor-semajnfinojn, la koncernaj respondeculoj plu laboras super la ceteraj antaŭviditaj eldonaĵoj.

Tiu ĉi estas grandega streĉo, ne nur homa, sed ankaŭ financa: por sukcesi, SES nepre bezonas vian subtenon!

Nome de la SES-estraro, mi tutkore antaŭdankas por malavara utiligo de la ĉi-kuna enpago.

Kaj denove, ĝojajn festotagojn al vi ĉiuj!

Perla Martinelli, prezidanto



IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

ALIĜILO

Al S-ro Angelo Mellini
Büntacher 21
5626 Hermetschwil

Mi aliĝas al la seminario Kiel "vendi" esperanton al la svisa publiko?, okazonta en Lucerno ekde la 7a de januaro 1995 je 10h00 ĝis dimanĉo la 8a je 17h00.

Familia nomo: Nomo:

Adreso:

Telefono/Telefakso: Profesio:

Membro de:

Oficoj en Esperantio:

Mi mendas-litan ĉambron ĉe Hotelo Steghof, por la nokto de sabato al dimanĉo 7a/8a de januaro (tranokto plus matenmanĝo en unulita ĉambro CHF 75, en dulita po 60, en trilita po 50, en kvarlita po 45).

Mi partoprenos la komunajn manĝojn ĉe la hotelo: sabaton tagmeze, sabaton vespere, dimanĉon tagmeze (forstreku la nedeziratan).

Mi notis ke la seminario estas senpaga, escepte de kontribuo por fotokopiita studmaterialo (10,- CHF), pagebla surloke.

Dato: Subskribo: